

Dansk



ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK



ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO



30. ARG.
FEBRUAR 1958
NUMMER

2



Antaŭ 6 jaroj francaj esp-istoj aĉetis la kastelon de Gressillon por fari el ĝi esperantistan kulturdomon. Poste la kastelo ĉiujare estis kadro de ampleksa kultura programo. Preleganto ĉijare estos i. a. d-ro Paul Neergaard.

DANSK ESPERANTO-BLAD

udkommer den 15. i hver måned.

Stof må være redaktøren i hænde senest den 25. i den foregående måned.

Redaktør: *Ole Nederland*,
Primulavej 6r, III, Odense.

Ekspedition: *Arne Kolle*,
Landlystvej 48, Silkeborg.

Abonnement: 8 kr. pr. år.
Eksterlanda jarabono: 6 d. kr. aŭ 10 re-
spondkuponoj.

Årsmødet i København



Ved årsmødet der afholdes i København 24.—26. maj 1958, agtes afholdt forskellige fagmøder. Interesserede bedes meddele komiteen, hvilke fagmøder de ønsker afholdt, og man vil da indpasse disse i årsmødets program.

Sidste frist for anmeldelse af fagmøder er 1. marts.

Skriv til:

Esperanto-årsmødet,
Fiolstræde 9, København K.

Deziras korespondi

S-ro Václav Klikar, Sanytrova 6, Praha I, Ĉehoslovakujo, 32-jara librovendisto, se eble kun sama profesiulo aŭ alia laboristo en librovendejo.



D. E. F.
meddeler:

HARZEN, påsketur, 3.—7. 4. 1958, 5 dage, 216 kr. Bus. Start fra Aarhus 3/4 kl. 7. Ankomst om aftenen til Bad Harzburg, hotel Deutsches Haus. Udflugter: svævebane Burgberg, Goslar, vandfald Radaŭ og Romker, Bad Grund osv.

ØSTRIG, 29/6—8/7, 10 dage. 475 kr. Jernbane fra Kbh. og Aarhus. Liggevojn fra Hamburg, næste morgen ankomst Salzburg og Werfen. Hotel Post, 7 dage med udflugter til saltminer Hallein, lystslot Hellbrunn, isgrotte osv.

ØSTRIG — ITALIEN — JUGOSLAVIEN, 6.—17. 7, 12 dage. 727 kr. Jernbane til Salzburg, herfra bus over Grossglockner til Triest (3 dage), Venezia (3 dage), Postojna grotter og Ljubljana i Jugoslavien (2 dg.), over Tauern-bjerger til Salzburg og med toget hjem.

HELSINGØR, Internationale feriekursus på Den internationale Højskole, 19.—26. 7., 7 dage. Kursus for begyndere, viderekomne, vordende Cseh-lærere osv. Pris 135 kr.

HARZEN, 27/7—31/7. 5 dage, 179 kr. Bus. Samme tur som ovenstående påsketur, blot skal vi bo på større rum i Goslar. Alt andet er ellers ens.

KONGRESTUR TIL MAINZ, 10 dage, 1.—10. 8. 465 kr. Bus. Overnatte i Hannover, næste eftermiddag ankomst til Mainz, deltage i kongres. Udflugter til Bingen, Rüdesheim, heldagstur på Rhinbåd til St. Goar osv. Hjemtur over Köln.

VEJLE. E-feriekursus på Idrætsskolen, 19.—26/10. Begyndere og viderekomne.

Udførligt program for hvert arrangement fås hos

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj.

Post 2 jaroj

Kun prudenta optimismo la sukcesplena Esp.-klubo de Fåborg elektis siajn metodojn

En periodo de 50-jaraj jubileoj ni ne forgesu la novajn klubojn.

Ne por diri ke maljuneco estas samsignifa kun disfalo estas notinde, ke juneco ofte signifas freŝecon, eltrovemon, klaran celadon. La klubo en Fåborg estas pruvo de tio.

Tiu kiu skribis ĉi tiujn liniojn konfesas sian admiron al la Fåborg-klubo, kiu post dujara ekzistado atingis membronombron de 60 kaj krome estimatan pozicion en la socia vivo de sia urbo.

Jena artikolo nature ne povos esti memoriga superrigardo pri aro da jaroj. Sed eble ĝuste pli utila en la plua puŝo antaŭen estas la demonstracio de efikaj metodoj kiajn sukcese ekaplikis progresema klubo.

Fåborg-esp. istoj ne estas fanfaronemaj, sed modestaj, kun ambaŭ piedoj firme starigitaj sur la teron. Ili konas la malfacilaĵojn.

„Ne pli da floroj“, petas la prezidanto, s-ino *Ellen Møller*. „Ni rigardu la aferon post dek jaroj, tiam ni pli multe scios ol hodiaŭ!“

Praktika uzo pli bona ol ĉia rekomendo

Tamen la prezidanto de la Fåborg-klubo ne malkonfesas, ke la komenco estis bona, la cirkonstancoj favoraj. Pri la fondiĝo ŝi rakontas:

— Ĝi hazarde okazis en la jaro de la mondkongreso en Kopenhago. Tiu kongreso donis al la klubo okazon akcepti multajn eksterlandajn esp-istojn. Tiel la klubanoj frue praktike povis uzi Esp. on kaj per tio montri al neesp-istoj la taŭgecon kaj valoron de la internacia lingvo. Tia prakti-

ko estas multe pli bona ol ĉia rekomendo.

De la fondiĝo la loka gazetaro montras sin ege favora, eble ĝuste pro tio ke ĵurnalistoj en urbetoj ĉiam serĉas nutraĵon al la legantaro. Ĉiukaze ĉi tiu favoro kaŭzas multajn gazetartikolojn, intervjuojn, menciojn kaj raportojn de klubaj aranĝoj ktp.

Ni ne povas esti tro dankemaj pro tio, finas s-ino Møller.

La klubo koncernu al ĉiuj!

Multaj diversspecaj profesioj havas reprezenton en la klubo de Fåborg. Pri tio komentas la prezidanto:

Estas necese, ke Esp-klubo koncernu ĉiujn verajn esp-istojn nedepende de lingvaj kapabloj. Nur tiel Esperanto havas la eblecon fariĝi la dua lingvo de ĉiuj homoj — la lingvo por vi kaj mi — por tiu kiu neniam faris ian ekzamenon kaj por tiu kiu plenumis la plej eminentajn ekzamenojn. Ankaŭ estas tre saĝe pri la disvastigo de Esp. pripensi: Neniu miras se profesoro N. aŭ instruisto B. scias bone la lingvon, sed se iu dommastrino sen lingva antaŭscio scias uzi Esp.-on, tio vekas atenton kaj pripensemon. Estas absolute necese en ĉiu Esperanto klubo havi lingve lertajn membrojn, sed ni neniam forgesu, ke Esperanto estu la dua lingvo de ĉiuj homoj.

Ne nur kaŝtrinkado

Studinte la klubprogramon de la pasinta jaro oni scias, ke en Fåborg ekzistas klubo multflanka. En 1957 la Fåborg-anoj povis partopreni en maskobalo, jarfesto, printempa festo kaj pakajfesto, sed ne nur oni povis festi. Krom la regulaj klubvesperoj la vesperaj kursoj atestas pri laboremo de la

esp.istoj en la urbo. En la aŭtuno startis 3 kursoj, kun pli ol duona cento da kursanoj. Kiom tio signifas al urbo kun nur 5000 enloĝantoj, estas klare kompreneble.

La libro-vendanto, s-ro *Poul Eriksen*, vendis dum 1957 librojn por 500—600 kr., kio aludas ĝeneralan studemon.

La interna forto

Kaj jen ni tuŝas la plej gravan problemon de ĉiu nova Esp.-klubo: la daŭra lertiĝo de la membroj.

Kun atentemo la Fåborg-anoj aŭskultis al la prelego de *Sv. Dragsted* okaze de la jar-festo en marto. Interalie li diris:

Ĉiam memoru ke ni devas progresi. Vi devas ekzerci nian lingvon, tiel ke vi iom post iom parolos ĝin pli bone kaj pli flue. Vi devas uzi Esperanton praktike. Vi devas prizorgi, ke la klubprogramoj iom post iom enhavos pli da Esperanto. Faru planon pri tio, tiel ke ĉe via 2-jara jubileo vi povos diri: „Nun ni scias pli da Esperanto“. — Ni devas havi la internan forton, sed kondiĉo por ĝi estas, ke ni scias Esperanton ĝisfunde, flue. Ni povas diri multe por Esperanto al la neesperantista publiko, sed ĉiuj argumentoj falas, se ni ne mem povas legi, kompreni, paroli Esperanton praktike.

Kunlaboro inter la kluboj

Dum sia jama ekzistado la Fåborg-klubo estis vizitata de eksterlandanoj el Aŭstrujo, Belgujo, Germanujo, Anglujo, Jugoslavujo, Nederlando kaj Japanujo, kaj la Fåborg-anoj ĝojas pri tio.

„Sed samgrade kiel la eksterlandaj vizitoj“, diras s-ino *Møller*, „estas valora tiu utilo kaj ĝojo, kiun donas la rilatoj inter la diversaj enlandaj kluboj“.

Kaj en Fåborg venas multaj gastoj el la ĉirkaŭaj kluboj. En Fåborg ili kaptas la fidon, ke tio, kion oni tie semis, portos fruktojn — ankaŭ ekster la urblimoj.

50-jara jubileo

de

Konversacia Esperantista klubo

Kopenhago

2-an de januaro 1958

(ĉe la jubilea festo 4-an de januaro)

PROLOGO

50 jaroj, longa tempo,
jaroj sekvis jarojn
de post KEK-aj pioniroj
startis siajn farojn.
Ili tre entuziasme
faris propagandon,
kaj en kursoj sin lertigis
scii Esperanton.

50 jaroj, longa tempo,
plena de laboro
ek de la unua spiro
ĝis la unua horo.
Kelkafoje bataladojn
kontraŭ nekompreneo
tre necesis, por atingo
de sukcesa pleno.

50 jaroj, longa tempo,
rekte laŭ la vojo
kaj hodiaŭ ĉe la festo
regu nur la ĝojo.
Ĉiam KEK vi restu preta
vi kaj la verduloj,
Por la tago vi akceptu
50 da gratuloj!

Gustav Kühlmann.

*

La 50-jara datreveno de la fondiĝo de Konversacia Esperantista Klubo en Kopenhago estis la 2-a de januaro, sed pro praktikaj kaŭzoj oni festis sabaton la 4-an.



Ĉe la festmanĝado de la jubilea festo partoprenis 59 personoj, en la vespera festo proks.100.

Inter la ĉeestantoj ĉe la festmanĝo estis f-ino Noll, kiu antaŭ 50 jaroj ĉeestis la fondiĝan kunvenon, f-ino Anna Petersen, kiu aliĝis la klubon antaŭ 50 jaroj, kaj pluraj svedoj.

Post la bonveniga parolado G. Kühlmann i. a. menciis „Politiken“ kiel unu el la iniciatintoj de la kursoj en 1908. Por CDEL parolis Sv. Dragsted, por la klubo en Malmö la prezidanto Hjalmar Andersson.. Parolis krome Esperanto-Andersson el Malmö kaj f-ino Noll.

Ĉe la vespera festo bonvenigis Gustav Kühlmann, kaj s-ino Kühlmann legis la prologon (vd. apudel).

La longa vico da salutoj komenciĝis per Sv. Dragsted, kiu en amuza maniero salutis la „patron“ kaj „fraton“ K. E. K. Kiel prezidanto de Laborista Esperantista Klubo parolis Aage Bense, kiu donacis direktantan gongon kiel dankon pro la bona kunlaboro inter la du kluboj. La Malmö-klubo pere de Hj. Andersson donacis belan gastlibron, en kiun ĉiuj festpartoprenantoj poste enskribis sian nomon, kaj ankaŭ li dankis pro bona kunlaboro. Por K. K. K. salutis s-ino K. Zacho, por Dana Esperantista Fervojista

KEK estas la unuaj literoj de *Konversacia Esperantista Klubo*. La nomo *Kopenhaga Esperantista Klubo* ĉiam estis nur la subtitolo, informas s-ro Kühlmann kiel korektigon al la recenzo pri la festlibro de KEK.

Asocio, Kopenhago, Henning Olsen, por la klubo en Lund Ole Olsson, por Studenta Esp. Klubo H. V. Rasmussen, por du grupoj (la malfideluloj kaj liaj 4 infanoj) Paul Neergaard, s-ino Haudebine kiel eksterlanda instruistino, por la klubo en Odense O. C. Lange, kaj por la izoluloj el ĉiuj landoj, Niels Olsson.

Kiel funkcia prezidanto Axel Nielsen dankis al la jubilea komitato pro la bone aranĝita festo, kaj s-ino Anna Riis voĉlegis telegramojn. Inter la donacoj troviĝas monsumo de 50 kr. de Victor Rude kaj tri libroj de la klubo K. K. K.

Post la 50-jara kanto „Hodiaŭ K. E. K. fondiĝas“ s-ino Anna Riis enkondukis Kluban Rerigardon kaj donis la vorton al f-ino Noll, kiu vigle kaj ĉarme rakontis pri la unuaj tagoj en la klubo, speciale pri la postkongreso en 1908, kiam ŝi travivis la plej grandan momenton de sia vivo sidante ĉe la tablo kun d-ro Zamenhof. — Paul Neergaard raportis pri la periodo 1926 ĝis 1930.

La Rerigardon daŭrigis Otto Jensen, tiama sekretario de la klubo, raportante pri la tre silenta periodo de 1930 ĝis 1934, kaj Gustav Kühlmann finis tiun punkton per raporto de periodo ĝis hodiaŭ.

Malgranda kanto „50-jara punkto“ de Kühlmann sekvis, kaj post tio oni malplenis la salonon por la balo, kiu daŭris ĝis la 1-a horo matene/nokte.

G. N.



Tilmeldelsesblanketter får hos kongresens repræsentant: C. D. E. L.s rejseafdeling, Pr. Jørgensgade 4 A, København N, giro 70617.

Tilmeldelse	til 31/3	efter 31/3
Kongresdeltager	kr. 54,00	kr. 60,00
Kongresdeltagers		
hustru/mand	„ 27,00 „	30,00
Unge ikke over 20,		
og studenter	„ 19,00 „	20,50

Omaĝo al la pioniroj Marie Schröder kaj Skeel-Gjølring

Dimanĉe la 5-an de jan. K. E. K.-anoj kolektiĝis unue en Assistens Kirkegård, kie f-ino Noll metis florkronon sur la tombon de f-ino Marie Schröder, poste en Sølled, kie sur la tombon de s-ro Fr. Skeel-Gjølring oni metis florkronon.

En memorigaj vortoj pri la du pioniroj f-ino Noll priparolis la gravan signifon kiun ili havis por la komenco de la dana Esperanto-movado.

VIGGO RITZAU MORTIS

Ekspolicestro Viggo Ritzau, Køge, mortis la 31/12 post longtempa malsaneco, 84-jara.

Viggo Ritzau estis studento de Herlufsholm kaj en 1898 fariĝis jura kandidato. Kelkajn jarojn li estis distrikta konfidato en Ebeltoft, en 1910 li fariĝis konfidato de la departemento de Randers, kaj de 1919 ĝis 1943 estis policestro en Køge, en kies Esperanto-klubo li faris grandan laboron.

Medlemmer af UEA erholder rabat; kongresdeltager ÷ kr. 8,00, hustru/mand: kr. 4,00.

Tilmeldelsesgebyr sendes til ovenstående adresse.

OFICIALA KOMUNIKO

Kongresejo: La Palaco de la Elektantaj Princoj de Mainz.

Akcepto: La Urbo Mainz akceptos la tutan kongresanaron en la kortego de la Kongresejo.

Ekskursoj: Dum la Kongreso okazas jenaj samtempaj tuttagaj ekskursoj:

1. Perŝipe sur la romantika Rejno, preter la fabela Loreley kun vizito ŝnurfervoja al „Germania“ kaj tagmanĝo en Bacharach/Steeg.

2. Per speciala vagonaro kun danckupeoj al la pentrinda Heidelberg, kun tagmanĝo en la Festhalo de Eberbach.

3. Per aŭtobuso, veturante en la Taunus-regiono, al la naskiĝurbo de Goethe, Frankfurto, kun akcepto en la Urbdomo kaj tagmanĝo en la ezotika Palmĝardeno. Du postkongresaj ekskursoj iros

1. Kvartage al la folkloraj montoj de Bavarujo kaj Tirolo.

2. Tritage al la Mondekspozicio en Bruselo.

Dumtagaj vizitoj tra Mainz kaj Wiesbaden okazas dum la kongreso.

Infana Kongreseto: La 3-a Internacia Infana Kongreseto okazas samtempe kun la U. K. en la Feria Domo de Gonsenheim, je 15-minuta tramveturado de la centra stacidomo de Mainz. Estas ekceptataj nur infanoj, kiuj parolas Esperanton, inter 6 kaj 13 jaraj. Bonvolu peti programon ĉe la kongresa oficejo.

Statistiko (ĝis fino de dec.): Aŭstrujo 16, Belgujo 7, Brazilo 3, Britujo 38, Bulgarujo 3, Danlando 9, Etiopio 1, Finnlando 1, Francujo 132, Germanujo 272, Grekujo 1, Hispanujo 6, Izraelo 1, Italujo 27, Japanujo 2, Jugoslavio 26, Maroko 2, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 39, Norvegujo 7, Novzelando 1, Pollando 5, Svedujo 48, Svisujo 23, Urugvajo 1, Usono 5.

Entute 680 el 27 landoj (Samdate: en Marseille 480 el 27 landoj, en Kopenhago 581 el 24 landoj).

C. D. E. L.s Kongresrejse-afdeling.

SUBTENANTOJ 1958 de CDEL

Kun ĝojo kaj dankemo ni ricevis jenajn kotizojn por 1958:

S-ro Poul Nielsen, Næstved	15,00
F-ino M. Noll, Kopenhago	15,00
S-ro Emil Vårst, Aalborg	15,00
S-ro Sv. Dragsted, Holte	15,00

Enpagitaj en 1957: 60,00

S-ro Alfr. Jensen, Holstebro	15,00
S-ino Ingeborg Olsen, St. Heddinge	15,00
S-ro Søren Olesen, Hirtshals	20,00
S-ro L. E. Kromann Jensen, Nykø-	
bing S.	15,00
S-ro C. Noe, Tang-Petersen, Bellinge	15,00

Stato la 25-an de januaro 1958 140,00

En 1957 la Subtenantoj de CDEL enpagis entute 855 kr. — Kiom en 1958 ? ?

Vi havas la respondon, — mi petas vin, ke vi jam hodiaŭ sendu vian kontribuon al

Centra Dana Esperantista Ligo,

Poŝtkonto 57370

Algade 11, Nykøbing Sjælland

L. E. Kromann Jensen.

D. S. B. kaj Esperanto

Post kiam la Danaj Ŝtatfervojoj pasintjare ekuzis Esp.on en informado al aŭtomobilistoj pri la pramtrafiko, nun denove venis signo pri intereso de DSB, bela 4-paĝa prospekto, per kiu esp. parolantoj povas sciiĝi pri la rabatvojaĝa sistemo.

„Tra la tuta Danlando“ estas ĝia nomo.

Teatraĵo Servo informas:

Por ke vi vidu, ke la Teatraĵo Servo daŭre ekzistas, mi permesas al mi informi vin, ke ni nun disponigas al la kluboj 5 teatraĵojn.

Krom la kvar antaŭe menciitaj ni tradukis el la angla

Spicaĵoj (n)

kaj samtempe oni petas min doni informon pri la ludtempo de la diversaj teatraĵoj. Mi tial atentigas, ke la ludtempo de

Danĝera Eksperimento estas	15—20 min.
La Kolbasoj	10—15 „
Granda Kverelo pri Bagatelo	ĉ. 10 „
Leteroj kaj Soldatoj	„ 3 „
Spicaĵoj	„ 5 „

Vi vidas, ke ne estas granda laboro lerni la rolojn, kaj krome estas bona maniero praktiki Esperanton. Mi estas certa, ke vi havos amuzan kunvenon, se vi ĝin komencos per teatraĵo, kaj la aktoroj krome havos plezuron de la antaŭa ekzerco. Do, faru la eksperimenton.

Skribu al la Teatraĵo Servo, kaj vi ricevos specimenojn de tiu teatraĵo, kiun vi preferas.

La Teatraĵo Servo

A. I. Hastrup

Hartmannsvej 23, Hellerup.

Svend Dragsted: **ESPERANTO** **GRAMMATIK**

*Fås hos klubbernes bogsælgere
eller hos CDEL's Libro-servo*

Heftet: Kr. 4,50
Indbundet: Kr. 6,50
Uundværlig for
danske
esperantister

La infanoj

*

La sep fratoj



Sur la bildo vi vidas la sep fratojn Jensen: (supre, de maldekstre dekstren) Peter, Jens, Hans (malsupre, de maldekstre dekstren) Nikolaj, Ib, Jørgen kaj Lars.

Ĉiu havas ŝatokupon, kaj laŭ la bildo estas eble diveni kiu el ili ŝatas

tromboni
ludi ŝakon
rigardi piedpilkan ludon
ludi manpilkon
rajdi
tamburi
boksi

supre = foroven, dekstre = til højre, ŝatokupo = hobby, trombono = basun, ŝako = skak, pilko = bold, tamburo = tromme, boksi = at bokse.

*

Io estas erara

en jena rakono pri Lis kaj Erna

En sia ferio Lis (14-jara) kaj Erna (15-jara) biciklis okcidenten de Kopenhago al

Esbjerg, kie ili devis resti dum unu semajno.

De Kopenhago ili ekveturis lundon je la 8-a, kaj ili kalkulis, ke mardon je la 18-a ili estos en Esbjerg.

La unuan tagon ili biciklis ĝis Odense, kie H. C. Andersen naskiĝis en 1805. Kiam ili vidis la katedralon de Odense, ili kalkulis, ke ili estis veturintaj per 15 km en ĉiu horo. La venantan tagon ili ekveturis de Odense je la 8,30-a en la mateno. Kiam ili vidis la ponton de la Malgranda Belto (finkonstruitan en 1935), ili kalkulis, ke de Odense ili estis veturintaj per 17 km. en ĉiu horo. Tra Jutlando ili biciklis malpli rapide, kaj ili vidis la konturojn de la plej okcidenta urbo de Jutlando nur je la 19.30-a, lacaj kaj dormemaj. Ili tamen sendis bildkarton hejmen. Ĝi tekstis jene:

Esbjerg, mardon vespere.

Karaj gepatroj.

Ni ĵus alvenis al la bela urbo ĉe la Norda Maro. Ni biciklis de Kopenhago entute 18½ horojn. Ni ĝojas, ke ni nun unu semajnon povos ripozi. — La bildo montras „Kronprins Frederik“, ŝipo de la linio Esbjerg-Harwich.

Koran saluton
Lis kaj Erna.

Erara = forkert, jena = følgende, okcidenten = mod vest, katedralo = domkirke, veturinta = kørt, ponto = bro, finkonstruita = færdigbygget, teksti = have ordlyd, entute = i alt.

*

LA SOLVOJ DE N-RO 1: *Novzelando, Kanado, Hindujo, Izraelo, Usono, Finnlando.* — Du gepatroj kaj du filoj = *filo, patro kaj avo.*

Inter tiuj kiuj solvos la problemon pri „La sep fratoj“ kaj trovos la logikan eraron en „Io estas erara“ okazos lotumado pri libropremio. Sendu la solvon antaŭ la 25-a de februaro.

TURISMA OFICEJO

arrangerer følgende rejser i sommeren 1958:

6.—21. juli (begge dage incl.):

En 16-dages rejse til

Rivieraen og Monaco

(Gennem Holland, Belgien og Luxemburg, og hjem gennem Schweiz.)

Vi bor på et 1. classes hotel i

Monte-Carlo (4 dage)

31. juli—11. august (begge dage incl.):

En 12-dages rejse til

Den romantiske Rhin: Verdenskongressen i Mainz

(Udflugt til Heidelberg og heldagssejltur på Rhinen.)

Begge rejserne foretages med ny, moderne turistbus.

Tilmeldelse og nærmere oplysninger:

RIGMOR og S. K. NIELSEN

Havepladsvej 129, Fredericia. Telefon 1935

Ny børneklub

På et møde holdt den 5/12 startedes iflg. „Kontaktilo“ et begynderhold for børn og unge, og samtidig stiftedes „Vigerslev Esp-Klub“, der ligesom „Amager Esp.-Klub“ har til formål at virke for udbredelsen af Esperanto mellem børn og unge og som på samme måde som A. E. K. indmelder alle medlemmer i alderen ml. 14 og 18 år i K. E. K, efter at K. E. K. for et år siden nedsatte kontingentet for disse aldersklasser til 50 øre mdl. og alligevel sender de pågældende både „Kontaktilo“ og DEB. — Til bestyrelse for den nye klub valgtes Birthe Carlsson (14 år, formd.), Lisbeth Nielsen (14 år) og C. R. Ege (kasserer og sekretær).

Spacŝpare

Laŭ roreto de roora ni povas disponigi por DEB 2m 1 jaro pri nur 120 paĝoj. Certe vi ne prizbas, ke tio kaŭzis, ke la inroso de jarkolekto enhavas multajn 3ste mallongajn artikolojn.

Por roodigi la sekvojn de la roreto nin ŝupis eksperimento pri ciferoj, kies 7aran valoron ni ja konas. Ĉu tamen tro 3viale?

SOLVO de la silabenigmo en n-ro 1: *lando, armeo, fablo, olivo, resendi, teorio, ordo* = *La forto de l' vero*. La premion gajnis ĉe lotumado f-ino Johanne Mikkelsen, Odder.

HEROLDO

DE ESPERANTO

*Duonmonata internacia organo de
la Esperanto-movado*

Prezoj en 1958

Abono tutjara kr. 22,00
Abono julio-decembro .. kr. 10,00
Anonceto ĝis 25 vortoj .. kr. 3,50
Anonceto 26 ĝis 50 vortoj kr. 7,00
Anonco pokvadratcentimetre 0,60

*Pri HEROLDO-libroj petu libro-
liston*

Dana peranto



S-ino G. JAKOBSEN
Carit Etlarsvej 14,
Aabyhøj.
Poŝtkonto 54133.

FOTO

Aftryk

til meget fordelagtige priser. Således kun 26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

Forlang prisliste!

Mange års erfaring med forsendelsesforretning. Garanti for omhyggelig udført arbejde.

Telf. 357.
Giro 66122.

Nia Foto,
Bjerringbro st.
v/Henning Nielsen,

S-ino P. De Cleene,

Novzelando, kiu antaŭ kelkaj jaroj vizitis nian landon kaj faris prelegon en multaj danaj E-kluboĵ, sendas saluton al ĉiuj, kiuj ŝin konas. Ŝi aldonas:

„Diru al la danaj gesamideanoj, ke mi ĉiam memoros la bonajn geamikojn, kiujn mi trovis tie. Estas neeble skribi al pli ol kelkaj, sed mi volas, ke ili sciu ke mi alte taksas ilin.“

Tiel s-ino De Cleene skribis al

L. Friis.

DANSK VEGETARISK FORENING

varetager vegetarernes fællesinteresser. Der kræves intet løfte af medlemmerne. Kontingent 7 kr. årligt. Aftøjet 8 kr., inkl. abonnement på VEGETARISK TIDSSKRIFT. Forlang gratis prøvenummer. Adresse: Agade 114, II, København N. Telefon: Gothåb 1163 u.

Ni rekomendas al Esperantistoj

restadon en nia unuaklasa hotelo. —
Esperanto parolata.

HOTEL DANIA, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.

☆ Esperanto-BOGTRYK
Indhent tilbud gratis og uden forbindelse hos Sønderjyllands ældste og største bogtrykkeri —

MODERSMAALET'S Trykkeri
Haderslev — Telefon 22031

A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev

*de N. Chr. Læssøe
Vestergade 91 I,*